

Alois Topič (1852-1927), la ĝardenisto, kiu ĉasis ornitorinĥojn

Oldřich Arnoř Fischer

Prelego por esperantista Klubo Brno, la 10-an de novembro 2020

En la jaro 1937 ĉeĥa verkisto, ĵurnalisto, estetikulo, mezlerneja kaj altlerneja pedagogo Jaromír John (propranome Bohumil Markalous, 1882-1952) ricevis 49-paĝan manuskripton de Alois Topič, ĉeĥo, kiu longtempe laboris en Aŭstralio. Al John plaĉis lia bela ĉeĥa lingvo, kiu estis uzata en la 70-aj jaroj de la 19-a jarcento. Tial li lian manuskripton eldonis kiel libron por infanoj.

Kiu estis aŭtoro de la manuskripto? Alois Topič naskiĝis la 3-an de marto 1852 en Přelouč (Bohemio). Tie li lernis en baza lernejo, poste en Pardubice li studis en mezlernejo. Li fariĝis ĝardenisto. Kiel juna metiisto li vizitis Varsovion kaj Erfurton, por ekscii ĝardenistan laboron en aliaj landoj.

Li estis unuenaskita filo de bienmastro. Tial laŭkutime li devis kontinui laboron de sia patro, fariĝi la bienmastro. Sed Alois enamiĝis kaj lia amantino devenis el malriĉa kamparana familio. En la 19-a jarcento tio estis neakceptebla. Tial Alois solvis la problemon tiel, ke li la 15-an de majo 1876 en Rohovládová Bělá apud Přelouč sekrete edziĝis kaj kun sia edzino foriris eksterlanden.

Aŭstralia (tiam kvinslanda) registaro serĉis spertajn laboristojn por granda botanika ĝardeno en la urbo Brisbane. La registaro al venontaj laboristoj pagis vojaĝbiletojn kaj transporton de ĉiuj iliaj valizoj.

Alois ne estis la unua familiano, kiu foriris eksterlanden. Jam lia pli juna frato loĝis en Novzelando. Tial junaj geedzoj enkuraĝis veturi en Kvinslandon, la landon, pri kiu ili preskaŭ nenion sciis.

Aloisie Topičová, juna edzino de Alois, kiu ŝin alparolis Lojzička, opiniis, ke ŝi devas preni en Kvinslandon siajn plumkovrilojn, kiuj estis plenaj de anseraj plumoj. Vane Alois al ŝi eksplikis, ke en Kvinslando estas varma klimato kaj la plumkovrilojn oni tie ne bezonas.

Junaj geedzoj veturis pertrajne el Přelouč trans Prago kaj Berlino en Hamburton. Precipe Lojzička tre suferis de nostalgio.

En Hamburgo la geedzoj loĝis en gastejo por elmigrintoj. Ili ne havis monon por veturado per rapida vaporŝipo, tial ili atendis velŝipon. En la gastejo ili renkotiĝis kun homoj de diversaj nacioj, sed nur malmultaj el venontaj elmigrintoj sciis bone germanan aŭ anglan lingvon. Bonŝance Alois Topič konatiĝis kun sveda familio de sinjoro Olsen, kiu antaŭe laboris en Usono kaj parolis anglan. Sed nature inteligenta Alois lernis ankaŭ vortojn de aliaj lingvoj. Ekzemple, kiam unu italino serĉis lakton, ŝi parolis pri *late* kaj Alois tiun italan vorton ellernis. Geedzoj Topič devis aĉeti multe da nutraĵo por longtempa veturado.

La 28-an de majo 1876 la fera trimasta velŝipo Reichstag ekiris. Multe da vojaĝantoj eksuferis de marmalsano. Kiam Alois resaniĝis, li fervore lernis anglan lingvon de sinjoro Olsen. Vojaĝantoj suferis de manko de bongusta akvo. Ili travivis ankaŭ kelkajn marajn ŝtormojn. Dum veturado unu infano, 15-jara italianino, mortis, sed du infanoj (ankaŭ itala) naskiĝis. Interesa estis observado de balenoj. La 17-an de septembro 1876, post kvar monatoj, la velŝipo akiris la urbon Brisbane, kiu estis ĉefurbo de Kvinslando.

La velŝipo Reichstag irante reen kraŝis kaj ĝia kapitano kun tuta ŝipanaro pereis.

En haveno multe da labordonantoj atendis laboristojn. Tiam Aŭstralio bezonis laboremajn homojn, kiuj sciis diversajn metiojn. Alois trovis bonan laboron en botanika

ĝardeno, kie li, sperta ĝardenisto, eklaboris en departemento de plimultigado de plantoj. Direktoro de la botanika ĝardeno estis sesdeĵara skoto Walter Hill.

Geedzoj Topič havis belan loĝejon, sed ili devis akcepti surprizojn de aŭstralia naturo. La unuaj estis kuloj kaj grandaj ranoj.

Aŭstralio estas interesa kontinento. En Biblio ni lernas, ke en komenco de historio ekzistis tero kaj maro (Genezo 1, 9-10). La tero estis prakontinento Pangeo. Antaŭ 900 miliardoj da jaroj la prakontinento Pangeo disfalis. Ĝia norda parto Laŭrazio enhavis nuntempan Nordan Amerikon, Eŭropon kaj Azion.

Suda parto Gondvano enhavis nuntempan Sudan Amerikon, Afrikon, Hindion, Arabion, Antarktidon kaj Aŭstralion. Aŭstralio apartiĝis de Gondvano. Aŭstralia faŭno kaj floro evoluis propranature, alie ol faŭno kaj floro de aliaj kontinentoj.

En Aŭstralio troviĝas ĉirkaŭ 250 mambestaj specioj (pli ol duono estas poŝbestoj), pli ol 700 birdaj specioj, pli ol 500 rampuloj kaj amfibioj (145 serpentaj specioj), pli ol 20 000 fiŝaj specioj (el ili 150 specioj estas dolĉakvaj), 150 araneaj specioj kaj pli ol 65 000 insektaj specioj. Al la serpentoj apartenas ankaŭ tajpano (*Oxyuranus scutellatus*), la plej venena serpento de la mondo, kiu povas mezuri pli ol 2,5 m.

La ovonaskuloj (Prototheria) metas ovojn, sed nutrigas siajn idojn per lakto. Ili havas neŝanĝeblan korpan temperaturon kaj hararon. En Aŭstralio la subklaso ovonaskuloj (Prototheria) enhavas la superordon kloakuloj (Monotremata) kun la ordo eĥidnoj (Tachyglossa) kun unu specio eĥidno aŭstralia (*Tachyglossus aculeata*) kaj la ordo ornitorinĥoj (Platypoda) kun unu specio ornitorinĥo platbeka (*Ornithorhynchus anatinus*). Ambaŭ bestaj specioj estas la atestoj de evoluo de mambestoj el rampuloj.

Ili ne estas antaŭuloj de nuntempaj mambestoj, nur la branĉo, kiu antaŭ 150 milionoj da jaroj apartiĝis de mambesta evolua linio. La ovonaskuloj same kiel la rampuloj kaj birdoj havas kloakon. La kloako estas komuna loko por ellaso de produktoj de intestoj, renoj kaj seksa aparato.

La ovonaskuloj observas konstantan korpan temperaturon. Mandiblo estas unu ostoj. Meza orelo enhavas tri ostetojn. Kolo konsistas de sep vertebroj, kiuj havas kolajn ripojn. Ŝultra artikolo enhavas korvan ostojn (*os coracoideum*). Ĉe aliaj mambestoj la ostoj ekzistas nur kiel malgranda proceso de skapolo (*processus coracoideus scapulae*). En ventro estas poŝaj ostoj (*ossa epubica*), sed ili ne servas al zorgo pri idoj, nur por movigado. Elkoviĝantaj idoj malfermas sian ovon per ova dento, kiu baldaŭ malaperas (same kiel rampuloj). Maskloj de ornitorinĥoj kaj eĥidnoj havas sur kalkano la spronon, kiu estas kunligita kun venena glando. Neniu scias funkcion de la venena sprono. Ovonaskulaj femaloj ne havas laktajn mampintojn, iliaj idoj lekas la lakton de sur haŭto.

La ornitorinĥo estis konata jam ekde la 18-a jarcento, sed eŭropaj sciencistoj ne kredis al rakontoj de maristoj pri la mambesto kun anasa beko. Eĉ kiam ili ricevis la unuajn preparitajn ornitorinĥojn, ili ilin forĵetis, ĉar ili opiniis, ke tio estas trompoj de preparistoj. Ili ankaŭ longtempe ne sciis, ke la ornitorinĥoj metas ovojn. Eĉ tiel granda natursciencisto kiel Alfred Brehm (1829-1884), opiniis, ke ornitorinĥa femalo naskas vivantajn idojn.

La ornitorinĥo estas la mambesto, kiu konstruas sian neston en terkavoj. Ĝiaj piedoj estas taŭgaj por naĝado, sed ankaŭ por fosado. Femalo konstruas neston, metas 1-3 ovojn (17,5 × 13,8 mm), kiujn varmigas. Same kiel ĉe birdoj, ĉe la ovonaskuloj nur maldekstra ovodukto funkcias. Elkoviĝantaj idoj havas en beko 12 dentojn, sed ili estas anstataŭitaj per kerataj procesoj. La ornitorinĥo estas raba besto, kiuj en akvo ĉasas krustaceojn, larvojn de insektoj, vermojn aj aliajn bestetojn. En akvo la ornitorinĥo havas fermitajn okulojn, kiuj estas protektataj per blanka la tria palpebro. Anstataŭ palposentaj haroj ĝi havas sensorganojn, kiuj kapablas percepti elektrajn signalojn de la predo. La ornitorinĥo havas dek seksajn

Ĥromosomojn. Femaloj havas 10 X (ikso)-Ĥromosomojn, maskloj havas 5 X- kaj 5 Y(ipsilono)-Ĥromosomojn.

La eĥidno, kiu similas al erinaco, ne havas dentojn. Ĝi voras formikojn kaj termitojn. Femalo metas nur unu ovon (15-16 mm), kiun portas en malgranda poŝo (*incubatorium*). La poŝo ne havas kontakton kun la poŝaj ostoj. Elkoviĝita ido mezuras nur 1,2-1,4 cm. Ĝi estas en la poŝo, sed nur ok semajnojn. Kiam al ĝi ekkreskas dornoj, ĝia patrino al ĝi ne plu permesas enpoŝiĝi.

En Nova Gvineo troviĝas tri specioj de kvazaueĥidnoj (*Zaglossus attenboroughi*, *Z. bartoni*, *Z. bruijani*), kiuj, same kiel la eĥidno aŭstralia, apartenas en la familio eĥidnedoj (Tachyglossidae).

Alia grupo de la mambestoj el la subklaso vivonaskuloj (Theria) naskas vivantajn idojn. La subklaso enhavas du superordojn: poŝbestoj (marsupioj, Marsupialia) kaj placentuloj (Placentalia). La poŝbestoj havas mallongajn tempojn de gravedeco, iliaj idoj naskiĝas ne plene evoluitaj kaj kreskas en poŝo de patrino, kie ili suĉas lakton. La poŝbestoj devenas el Suda Ameriko. Ĝis nun en Ameriko troviĝas didelfoj (*Didelphis virginiana*, *D. marsupialis*), kiuj migris en Nordan Amerikon, eĉ en Kanadon. Multe da poŝbestoj migris en Aŭstralion trans Antarktidon, kiam Suda Ameriko, Antarktido kaj Aŭstralio estis partoj de Gondvano kaj en Antarktido estis varma klimato. En Aŭstralio la poŝbestoj kreis multe da diversaj formoj, kiuj estas analogoj de mambestoj de aliaj kontinentoj. Kanguruoj havas rolon de unĝuloj, vombatoj (*Vombatus ursinus*) similas al marmotoj, poŝ-formikmanĝuloj similas al amerikaj formikmanĝuloj, koaloj al bradipoj. En Aŭstralio evoluis poŝ-musoj, poŝ-sciuroj, poŝ-talpoj. Diabla tasmana (*Sarcophilus viverrinus*), poŝ-marteno (*Dasyurus viverrinus*) kaj ekstermita poŝ-lupo *Thylacinus cynocephalus* ludis rolon de rabaj mambestoj.

La tria grupo estas placentuloj, kiuj migris en Aŭstralion el Azio: ronĝuloj (Rodentia) kaj vespertoj, ĥiropteroj (Chiroptera). Homoj alportis en Aŭstralion hundojn, katojn, vulpojn, ŝafojn, kuniklojn, ĉevaloj kaj aliajn mambestojn.

La unuaj homoj (aborigenoj) aperis en Aŭstralio antaŭ 60 – 20 miloj da jaroj (laŭ diversaj fontoj). Ili alportis hundon, kiu en nova kontinento sovaĝiĝis kiel dingo.

La 26-an de februaro 1606 Aŭstralion malkovris nederlanda kapitano Willem Janszoon (1570?– 1630). Abel Janszoon Tasman (1603-1659) malkovris Tasmanion.

Kvankam de 500 miloj – 1 miliono da aborigenoj en la jaro 1770 brita admiralo James Cook (1728-1779) diris, ke Aŭstralio estas nesetlita lando. Kiam en la jaro 1783 usonanoj venkis britojn en Usona Milito de Sendependeco (1775-1783), britoj jam ne plu povis deporti siajn krimulojn en Amerikon, tial ili ekdeportis ilin en Aŭstralion. En la jaro 1788 brita kapitano Arthur Phillip alportis la unuajn krimulojn en Aŭstralion. Blankuloj setligis precipe orientan parton de Aŭstralio.

Sed ni revenu al Alois Topič.

En la departamento de plimultigado de plantoj en botanika ĝardeno oni plantis cedrojn, kafarbojn, kakaoarbojn, sukerkanon, kokosajn palmojn kaj tropikajn ornamajn arbedojn. Registara financa kontribuo ne estis granda, tial la botanika ĝardeno interŝanĝis plantojn, semojn kaj aŭstraliajn bestojn kun aliaj botanikaj ĝardenoj. Tial Alois Topič lernis kapti aŭstraliajn bestojn.

En la 19-a jarcento ankoraŭ ne ekzistis leĝoj por protekto de aŭstralia naturo, bestoj kaj plantoj.

Granda problemo estis seka varmega vetero.

En la jaroj 1870-1880 en Aŭstralio okupiĝis pri primitiva agrokulturo precipe germanoj. Ankaŭ Alois Topič volis havi farmon, sed lia ĉefo avertis lin, ke tio ne estas facila. Alois tion provis, sed vane li elspezis monon, kiun li antaŭe ŝparis tri jarojn.

Alois priskribis laboron de ŝaftondistoj, vivon de vagantoj kaj aborigenoj (aŭstraliaj nigruloj). Originaj aŭstralianoj, la aborigenoj, estis bonegaj ĉasistoj, sed Topič sen sentimento skribis, ke ili pro tio elmortas, ke ili kapablas nek paŝtigi bestojn nek okupiĝi pri agrokulturo: „Tiu nacio, kiu ne ekkomprenos, kio estas laboro, tiu devas pereii.“

Alois ne estis turisto. Li devis gajni monon kaj nutri sian familion. Tial li detale eksciis naturon de Aŭstralio.

Najbaroj invitadis geedzojn Topič en siajn preĝejojn. Ili iradis en preĝejojn de diversaj eklezioj, sed observis ankaŭ kverelojn inter kredantoj.

En Aŭstralio naskiĝis filo (kies nomon mi ne trovis) kaj filino (Marie Luisa) de geedzoj Topič.

La dua jaro de farma laboro estis nesukcesa, ĉar ĉion neniigis inundoj.

Kiam Alois provis breddi kokojn, grandaj lacertoj (*aguana*) voris ne nur ovojn, sed ankaŭ kokidojn. Viando de lacertoj estas bongusta, precipe la viando de vostoj.

Post kvar jaroj Alois revenis en Bohemion. Lia patro por li aĉetis bienon kun gastejo en Nové Město super Cidlina. La patro baldaŭ mortis. Alois ne volis fariĝi gastejestro, ĉar li ne ŝatis alkoholon. Li ne volis gajni monon de mizereco de alkoholuloj kaj fumantoj. La homo, kiu vidis grandan parton de la mondo kaj estis sperta metiisto, ne volis sidi en surkraĉita bohemia gastejo inter ebriuloj. Tial li vendis gastejon kaj aĉetis bienon apud Roudnice nad Labem.

Post kvin jaroj Lojzička kun ambaŭ infanoj revenis en Bohemion. Sed en la sama tago, kiam ili elŝipiĝis en Hamburgo, patrino de Alois mortis.

Alois restis sola, tial li faris ekskurson en Cejlonon.

En la jaro 1885, post reveno, li ĉasis kaj preparis diversajn bestojn. En la 19-a jarcento ĉasistoj en Aŭstralio uzis kruelajn metodojn de ĉasado, ekzemple pafado de bestoj per la kugloj dum-dum. Ornitorinĥoj ofte kaptiĝis en fiŝistajn retojn, en kiuj ili dronis.

En la jaro 1888 Alois ricevis leteron el Prago. Profesoro Antonín Frič (1832-1913) lin en la nomo de komitato de Ĉeĥa Muzeo (nuntempa Nacia Muzeo) en Prago petis por sendo de kelkaj aŭstraliaj bestoj. En la sama tago patrioto Alois Topič pafmortigis du kanguruojn. Li aldonis ankoraŭ kelkajn birdojn kaj marsupiulojn. Tio estis lia donaco al samlandanoj en Prago.

En la jaro 1890 Alois Topič revenis en Bohemion, kie li aranĝis ekspoziciojn. Sed li gajnis malmulte da mono. Iu al li konsolis vendi ŝafajn maldikajn intestojn el Aŭstralio. Bohemiaj buĉistoj faris kolbasetojn uzante aŭstraliajn intestojn, kiuj antaŭ transporto estis konzervitaj per salo.

Alois Topič revenis en Aŭstralion. Tie li loĝis en farmo de familio Lammb. En la jaro 1893 antaŭ Kristnasko li pafmortigis pteropojn, grandajn vespertojn, kiuj voris fruktojn. La pteroporoj havis unumetran disetendon de flugiloj.

Lasta, la kvara vojaĝo en la jaro 1902 daŭris tri monatojn.

Li eksciis ankaŭ laboron de orfosistoj. Kiam li vivis kun du orfosistoj, li pafmortigis pli ol centon da ornitorinĥoj kaj kelkajn vombatojn (*Vombatus ursinus*). Post reveno en Bohemion li ricevis koverton. Liaj aŭstraliaj amikoj al li sendis la ĵurnalon *Age*. En la ĵurnalo oni publikis novan leĝon de Unuiĝitaj Aŭstraliaj Ŝtatoj, kiu malpermesis pafadon kaj kaptadon de aŭstraliaj bestoj kaj birdoj.

En la jaro 1927 biciklis 75-jara Alois Topič el Přelouč en Nový Bydžov-on. Li malvarmumis, malsaniĝis kaj la 10-an de junio 1927 en Nový Bydžov mortis.

Li estis la unua homo, kiu observis, kiel femaloj de ornitorinĥoj nutrigas siajn idojn (1899). El letero de Alois Topič al profesoro Sixt en Nové Mýto:


„La plej bonaj spertuloj por ornitorinĥoj estas la orfosistoj, kiuj laboras sur sablaj deponaĵoj de riveroj kaj riveretoj. Ofte ili serĉante la oron elsabligas ornitorinĥan neston. La nesto havas formon de pelvo, ĝi estas alta kiel ronda panbulo. Ĝi situas super inunda lineo, por ke dum inundo la akvo ĝin ne penetru. En la nestada tempo femalo elŝiras sian kaj masklan hararojn de dorso kaj la hararon uzas por sternado de la nesto. La femalo ne havas laktajn mampintojn, tial ĝi ekkuŝas sur dorson kaj ĝiaj idoj elpuŝas la lakton el retetaĵoj. La lakto fluas en haŭtan sulketon, kiun kreas laŭlonga muskolo sur ventro de la femalo. De tie la ornitorinĥoj trinkas la lakton. La ornitorinĥoj restas en sia nesto ĝis la tempo, kiam ili akiros la longecon 12 cm. Poste ili elnestiĝas kaj kiam ili estas longaj 20 cm, ili aŭdacas enakviĝi, se ilia patrino ilin akompanas. Dum tempo de nutrigado de idoj la femalo aspektas kiel tre maldika.“

Alois Topič ne estis sciencisto, sed li estis laborema homo kaj bonega observanto. Lia nomo estas konata, ankaŭ vojaĝanto Jiří Baum (1900-1944) pri li sciis. Danke al priskribo de suĉado de ornitorinĥoj la nomo Topič scias eksterlandaj sciencistoj. Ili lin citadas en faka literaturo. Nur en nia lando oni nian ĉasiston de ornitorinĥoj kaj patrioton, kiu konatigis nin kun aŭstralia faŭno, tute forgesis.

Rekomendita literaturo

- AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. 1-a eldono, Dobřichovice, Kava-Pech, 1375 paĝoj.
- BAUM, J. 1938: On the habits of Australian spider *Dinopsis subrufus* L. Koch. Věstník Československé zoologické společnosti, 5: 28-33.
- BAUM, J. 1958: Kolem zeměkoule. 1-a eld., Prago, Mladá fronta, 248 paĝoj.
- CHURÝ, J., CRHA, J. & FRAŇO, J. 1966: Biologie se základy zoologie. 1-a eld., Prago, Státní zemědělské nakladatelství, 529 paĝoj.
- FIKEJZLOVÁ, R. 1941: Austrálie očima ženy. 1-a eld., Prago, Česká grafická unie, 130 paĝoj.
- FISCHER, O. A. 2018: Jiří Baum (1900-1944). Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 4-an de aprilo 2018. – www.literatura.bucek.name/brno//fischer_jiri-baum.pdf.
- FUCHS, D. & BAEHR, M. 2000: Austrálie. Cestování a kultura, poznávání zvířat a rostlin. 1-a eld., Prago, Miloš Uhlíř – Baset, 279 paĝoj.
- JOHN, J. 1954: Australská dobrodružství Aloise Topiče. Příhody českého lovce ptakopysků. 3-a eld., Prago, Státní nakladatelství dětské knihy, 135 paĝoj.
- MARTÍNEK, J. 2011: Alois Topič: Lovce ptakopysků z 19. století. <https://www.hedvabnastezka.cz/cestovatele/6374-alois-topic>; 02.09.2011.
- ROBERTS, J. M. 2000: Ilustrované dějiny světa VI. Vývoj evropské civilizace. 1-a eld., Prago, Euromedia Group, Knižní klub kaj Balios, 192 paĝoj.
- SOCHA, V. 2010: Encyklopedie dinosaurů ve světle nejnovějších objevů. 1-a eld., Prago, Libri, 263 paĝoj.
- VESELOVSKÝ, Z. 1986: Výlet do třetihor. 2-a eld., Prago, Mladá fronta, 318 paĝoj.

SISTEMO DE AŬSTRALIAJ MAMBESTOJ



- * Superordo MONOTREMULOJ (Monotremata)

Ordo EĤIDNOJ (Tachyglossa)
 Familio EĤIDNEDOJ (Tachyglossidae)
 Specio Eĥidno aŭstralia *Tachyglossus aculeatus* (Shaw, 1792)

Ordo ORNITORINĤOJ (Platypoda)
 Familio ORNITORINĤEDOJ (Ornithorhynchidae)
 Specio Ornitorinĥo anasbeka *Ornithorhynchus anatinus* (Shaw, 1799).

- **Superordo MARSUPIULOJ (Marsupialia): kanguroj, koaloj, aliaj poŝbestoj.
- ***Superordo PLACENTULOJ (Placentalia): ĉiuj aliaj mambestoj inkluzive de homo.